



kverkoj aŭtune vestitaj
en St-Vallier de Thiey (06)

espéranto

Provence

kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio

n° 102 - aŭtuno 2015

federacia retejo

www.esperanto-provence.org

nia federacio sur Facebook

[www.facebook.com/
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

prezidanto

Pierre Oliva
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

baza kotizo por aliĝo

(kun la gazeto) : 6€

ĉeko al :
"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la

kasisto

Nicole Lafitte
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
nlpolecamp@gmail.com

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain
61 Montée du Castelar
83460 Taradeau
06 42 19 68 51
p.vilain83@orange.fr

limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°
25-a de Decembro 2015

bonvolu sendi al la supra retadreso
antaŭdankojn pro viaj kontribuajoj

Vorto de la Prezidanto

Jam finiĝis la somero kaj mi ĉiam pensadas pri la Universala Kongreso en Lillo ! Por la esperantistoj, kiuj partoprenis en tiu evento, kiom da interesaj prelegoj, instruaj malkovroj, mirindaj renkontoj kun eksterlandanoj ! Mi opinias, ke dum ankoraŭ kelkaj monatoj, ni profitu de tiu evento por montri al la « potenculoj », kiujn ni renkontos, ke nia lingvo senprobleme funkcias tra la tuta mondo, kaj ĉefe por la plezuro. Ni ankaŭ devas plu survoĝigi ĉiujn federaciajn agadojn niajn ! Ek do al la laboro, kaj dankon pro via disvastigado de nia lingvo.

Pierre Oliva

Federacia agado

Kunvenis la komitato

Dimanĉon la 18-an de Oktobro okazis en Marsejlo komitatkunsido de *Espéranto-Provence*. El la diversaj pritraktitaj punktoj, ni ĉefe parolis pri grava evento, kiu okazos en nia regiono :

la Nacia Kongreso de *Espéranto-France* de la 5-a ĝis la 8-a de Majo 2016 en Marsejlo.

kadre de tiu kongreso okazos ankaŭ :

la Membro-Kunveno de nia Federacio *Espéranto-Provence*.

Bonvolu jam noti tiujn eventojn en vian agendon.
(*Pliaj informoj aperos en la sekva numero de via gazeto*)

Aldone al tiu-ĉi gazeto, vi ricevis ankaŭ aliĝilojn por la staĝoj novembro
en **Le Beausset** kaj marta en **Les Issambres**.

La organizantoj esperas, ke vi multnombre aliĝos
al unu el tiuj eventoj, eble eĉ al ambaŭ.

Tiel vi havos la okazon ne nur esti en amika kaj internacia etoso,
sed plie plibonigi vian lingvokonon aŭ eĉ perfektigi en ĝi.

La ricevintoj de la reta versio ankaŭ malkovris longan raporton de *Jean-François Cousineau* pri la Lilla Universala Kongreso (*vidu la paĝon 5-an*).

Se ricevintoj de la nura papera versio ŝatus ricevi la tekston de J.F.,
ili petu tion de la redaktoro.

Forumoj de asocioj

- **Fréjus** : le 6 septembre

- **Marseille** : Au parc Borelly, le 6 septembre, le stand très bien placé a reçu la visite de centaines de personnes dont une très grande partie n'avait jamais entendu le mot "espéranto". "Tant mieux", déclaraient les responsables.

Au moins, ces gens là sont ouverts et ne répètent pas les préjugés, diffusés par ceux qui croient faire l'opinion mais n'y connaissent rien".



- **La Ciotat** : Le 12 septembre, le Forum était placé sous le thème " L'Europe et les jeunes". Le stand d'Espéranto-La Ciotat a été le seul à respecter le sujet, avec des informations sur les associations de jeunes dans l'Union Européenne, (19 sur 28 pays mais des membres dans les autres), les examens du Conseil de l'Europe dans le Cadre Européen des Langues, la représentation de l'espéranto au Conseil Consultatif de la jeunesse, à la réunion internationale de coordination des associations de jeunes et à UNIS pour l'action interculturelle (Réseau Européen contre le racisme, le fascisme et le soutien aux migrants et réfugiés).

Les livres exposés étaient des traductions de la littérature des 28 pays, ce qui nous a valu l'étonnement d'une Anglaise, traductrice professionnelle, époustouflée qu'on puisse traduire Robert Burns, ou d'une Finlandaise devant le "Kalevala" !

Sans parler d'un Allemand, appréciant qu'il y ait un livre en espéranto sur les bières allemandes !

Pour voir un reportage vidéo sur ce forum de La Ciotat : <https://youtu.be/KYW6HC97d1g>

comptes-rendus de R. Triolle

- **Le Beausset** : La 12an de Septembro okazis forumo de la asocioj. Komprenoble, la loka klubo starigis budon por propagandi esperanton, kun la esperanta flago, fotoj de la Lilla UK, libroj, revuoj, bildrakontoj, kalendaroj, afiŝetoj, prospektoj kun informoj pri la lokaj Eo-kursoj. Pasantoj interesiĝis pri la lingvo kaj la movado, petis klarigojn. Kelkaj diris, ke ili volas lerni nian lingvon, sed ne havas tempon. Eble, ili perdas tempon ronkante vidalvide al televidilo ! (*Aĥ ! Ankaŭ mi foje faras tion ! Ĉu mi pentu pri tio ? n.d.l.r.*) La plimulto akceptis senpagajn kalendarojn. La vetero estis bela, la temperaturo taŭga, kaj, dum la tuta tago, ni propagandis esperanton.

Ni esperas akcepti novajn komencantojn en niaj baldaŭaj kursoj.

raportis A. Rémy



El niaj federaciaj asocioj



04 - E.K.E.M. - Esperanta Kulturo en Manosque

Dans le cadre des "Correspondances de Manosque", l'événement littéraire qui a eu lieu du 23 au 29 septembre, et aussi à l'occasion de la Journée Européenne des Langues le 26 septembre, Espéranto-Manosque a fait découvrir notre langue au public :

- **jeudi 24**, de 10h à 16h30 : "**Komuniku per Esperanto**" - atelier de correspondance où il était proposé aux enfants et adultes, depuis un écritoire, d'envoyer en langue internationale des messages préparés pour étonner, intriguer... Les curieux furent

aussi initiés à la facilité de l'espéranto par des activités ludiques.

- **samedi 26** : pour la Journée Européenne des Langues, "**Journée Porte ouverte sur l'espéranto**" - expo, films, foire aux questions, atelier de correspondance, cours express, animations tout âge, lecture bilingue (texte de Giono)... et verre de l'amitié...

Ces deux initiatives ont été publiées sur le site de la Journée Européenne des Langues, dans la rubrique



"événements", ce qui a valu à notre association les félicitations de Katalin Kovàts qui les a republiées sur son site "Edukado.net".

- **nouveau courriel de notre association :**
esperantomanosque@gmail.com

infos : Jean-François Bettus



05 - Espéranto - Gap

Fête de la Paix

Ce dimanche 28 juin, il fait très beau à Charance, près de Gap. Les responsables de stands espèrent accueillir beaucoup de monde pour cette Fête de la Paix. Les visiteurs ne seront pas nombreux mais une rencontre intéressante a lieu : une militante de l'APSO, Amis du Peuple du Sahara Occidental, vient nous rappeler la situation dans ce pays et elle réagit en entendant le mot espéranto. Elle est chargée de la coordination avec Jeunesse et Sport pour l'organisation du match de foot à Lille des Sahraouis et des espérantistes. Le sport est un vecteur de rencontres et, espérons le, d'amitié aussi.



Foire bio Génépi

Les 12 et 13 septembre, la Foire bio génépi accueille près de 180 stands au plan d'eau d'Embrun et de nombreux visiteurs. A plusieurs reprises, l'espéranto peut être entendu aux abords du stand et c'est bien agréable. C'est ainsi que je découvre l'un des nouveaux bénévoles qui travaillera au « Centra Oficejo » à Rotterdam en 2016. Je propose aux enfants et adolescents de parler de cette langue avec leur(s) enseignant(s). C'est aussi l'occasion de faire connaissance avec l'un des responsables d'Alternatiba que nous retrouverons à Grenoble lors de la Journée européenne des Langues le samedi 26 septembre. Même la pluie s'est invitée pour arroser notre semence !

comptes-rendus : Monika Arnaud

info : L'Assemblée Générale d'Espéranto-Gap aura lieu le samedi 31 octobre à 14 h, Salle de la place Grenette, et pour ceux qui le désirent, à midi, repas tiré des sacs pour avoir le temps d'échanger un peu.



83 - Esperanto-Klubo Fréjus - Saint-Raphaël

Les réunions hebdomadaires se déroulent désormais tous les mercredis, de 15h à 17h (sauf pendant les vacances scolaires), à la Maison des Associations, rue de la Soleillette, à Saint-Raphaël.

"Zamenhof-festo" : samedi 12 décembre



84 - Centre Culturel Espéranto d'Avignon

La 37-a Zamenhofa Tago okazos en *La Souvine* la dimançon 13-an de Decembro.

- je la 10-a : prelego de *Mari-Roza kaj Pascal Vilain* pri la jena temo : "Amikejo, la forgesita lando".

- je la 14-a 30 : skeĉoj, poemoj, rakontoj, kanzonoj...
informoj ĉe esperanto-avignon@laposte.net

Kongresoj kaj staĝoj

La 100-a Universala UEA-Kongreso en Lillo

Nia federacio kaj la 100-a U.K.

Pluraj Provencanoj, membroj aŭ ne de nia federacio, partoprenis en ĝi. Kelkaj eĉ aktive helpis :

en la organizo : R. Triolle

en la disvolviĝo : deĵorado ĉe la informejo : J. Ratouchniak, M. kaj L. Prezioso ; libroservo : M. Cerisay ; kontrolo de la enirbiletoj : J-F. Cousineau ; helpo al ILEI kaj en la ekstera programo : M. Arnaud ; teknika kaj rilata helpoj en la kultura programo : J-F. Cousineau

en la programo : prelegoj pri Provenco kaj pri lingvoinstruado : R. Triolle ; teatraĵo (" La Viro-semo " de Violette Ailhaud, tradukita de Daniel Moirand, prezentita plurfoje de La Cikadoj, t.e Sylvaine Le Magadure el Aix kaj Hélène Seigle el Pertuis, kun teknika helpo de Yannick Le Magadure kaj Céline Bernard).

Eble aliaj helpintoj ne aperas en tiu listo ; se tiel estas, pardonon al ili pro la forgeso.

Xavier Dewidehem, prezidinto de la LKK, varme dankegis ĉiujn okaze de la tutlasta kunsido de la LKK, la sabaton 10-an de Septembro.



la Provencanoj en Lillo

Mia unua Universala Kongreso de Michel Cerisay

Mi partoprenis en la centa UK, en Lillo, de la 25-a de Julio ĝis la 1-a de Aŭgusto 2015.

Vendredon la 24-an, mi trajnis per TGV ĝis la stacidomo "Lille - Europe", kiun mi atingis kvar horojn kaj kvaronon post mia foriro. Dudek minutojn poste, mi eniris la kongresejon "Le Grand Palais", kiu bone meritas sian nomon. Mi partoprenis en la pretigo de la materialo por la kongressakoj.

Sabaton, kiel helpanto, mi transdonis koverton kaj kongressakon al la gekongresanoj, laŭ ilia kongresa numero. Tiu ago devigis min paroli Esperante, kaj tiel plibonigi mian paroladon.

Dum la oficiala malfermo, la dimanĉon, ni aŭskultis kelkajn bonvenigajn vortojn de S-ro Frédéric Cuvillier, deputito kaj urbestro de Bulonjo-ĉe-maro, la sola politika elektito el Francio, kiu ĉeestis. Li jam estis la urbestro de Bulonjo-ĉe-maro en 2005, okaze de la tiama jubilea kongreso.

Mi vidis kelkajn geesperantistojn de nia regiono, sed ne multe.

La ĉefa graveco, laŭ mi, estas ke mi babilis, parolis, paroladis kun multe da personoj, ne francparolantoj (interalie : rusino, rumano, Kanadano (angloparolantino), Beninano, Kubano, Usonanoj, japanoj, ĉinoj, francoj, ktp...).

Resume, mi havis multe da agrablaj kontaktoj.

Multe da diversaj budoj, atelieroj, prelegoj, teatraĵoj, koncertoj, ktp... ebligis aŭdi kaj praktiki la lingvon.

Ĉar mi estis helpanto, ofte oni petis de mi informojn. Mi faris kelkajn erarojn dum miaj diskutadoj sed mia(j) kunparolanto(j) nur ridetis. Mi konstatis, ke multe da kongresanoj parolis preskaŭ pli malbone ol mi... Do, mi nun ne plu hezitas ! Oni plibonigas sian paroladon praktikante !

Ni estis 2689 partoprenantoj el 81 landoj, kaj nur 722 francoj ! Kie estis la aliaj ?

Dank' al la preskaŭ dumil samideanoj el aliaj landoj, la UK estis la plej bona maniero praktiki nian internacian lingvon.

La venonta UK okazos en Nitra (Slovakio) de la 23-a ĝis la 30-a de Julio 2016.

Alia raporto... ne engaĝita... pri la Lilla UK.

Ne nur raporton de *Michel Cerisay* mi rivevis, sed ankaŭ alian de *Jean-François Cousineau*.
Bedaŭrinde, vi ne povos legi ĝin en ĉi tiu gazeto.
Nur du erojn mi emis eltiri, por povi ilin komenti :

"Tiu UK ege plaĉis al mi pro la milda agrabla Lilla vetero. Imagu : inter 12° kaj 24°C, kiam en la cetera lando la temperaturo altis inter 30° kaj 40°C... Vera ĝuinda feliĉo (kiun la Nordanoj, fakte, tute ne povas kompreni !!!)..."

> Efektive, *J.F.*, mi tute ne povas kompreni. Kial do, laŭ vi, mi transloĝiĝis al la varma suda Francio ? Sed plaĉas al mi, ke la milda norda vetero tiel efikis sur vin ĝis senbridigo de viaj imagpovo kaj kreemo !
Ĉu mi ree sendu vin norden - tamen viakoste ! -, kiam mi nepre bezonos tekston por nia gazeto ?

"Nu, ĉar mi subite memoras pri atentigo de *Pascal*, ke la bulteno entenu nur 8 paĝojn, kaj pri la fakto, ke verŝajne aliaj partoprenintoj de la UK raportos pri siaj travivaĵoj, mi vole nevole haltu ĉi tie mian kompren-eble ne sufiĉe plenan protokolon."

> Ne sufiĉe plena protokolo ? Mi supozas, ke tio estas humuro, ĉu ne, *J.F.* ? Mi provis engaĝigi vian tekston, kiu "ŝtelis" pli ol kvar paĝojn el la 8 disponeblaj !

Pro tio, mi devis decidi, cetere laŭ via propono, sendi vian "ne sufiĉe plenan protokolon" sub la formo de PDF-dosiero, aldonita al la gazeto.

Sed promesu, ke tio ne decidigos vin neniam plu kunlabori ! Vi ja estas, kaj espereble restu, fidela kaj fidinda enhavkontribuanto !

Pascal V.

Ero el la kultura programo en la 100-a UK

Okaze de la 100-a UK, **Flavie Wakako Audibert**, federaciano el la Marsejla asocio, havis la okazon prezenti sian dancspektaklon "HAFU" al la kongresanoj.



Jen kelkaj vortoj ŝiaj pri la spektaklo :

« Mi tre ĝojas prezenti tiun dancadon okaze de la UK 2015 en Lillo. Dank' al miaj gepatroj *Kazue Sugawara* kaj *Michel Audibert* (fama Esperanto-aktoro), mi fieras kontribui al la arta vicleco de la Esperanto-movado. »

Flavie Audibert (Trupo *MaWanoMa*) : danco, koregrafio ; *Robert Serfati* : reĝisorado
François Taeger : muzika kreado ; *Loïc Virlogeux* : luma kreado

Prezento de HAFU

Duobla kulturo. Francio - Japanio. Miksiteco.

La celo estas doni sencon pere de la korpo al ambivalenca esprimado. La dispecigita korpo, la ununura korpo. Ĉu la animo havas kulturen identecon? La movoj ekprenas la pripensadon pri aparteno. La demando 'Kiu mi estas?' ekhavas sencon en duobla gestado kies origino estas tiu duobla aparteno. Do ekaperas la memoro pri la denaskitaĵo kaj la kutimo pri la akirititaĵo.

Ĉu la danco povas malfermi pordojn, establi pontojn inter miaj mioj (egooj), nun en Francio, kaj aliflanke hieraŭ, antaŭ mia naskiĝo, en Japanio...? La muziko kaj la sona fono (voĉoj) akompanas laŭ sia tuta graveco ĉi tiun identecan serĉadon. Mi dancas tiun, kiu mi estas... La celo estas do preteriri la psikanalizan serĉon por direktiĝi al pure artista esprimado...

Kun la voĉoj de *Kazue*, *Hideko*, *Michel* (ekstrakto de la teatraĵo *Trompo*, de *Emilija Lapenna*).

laŭ dokumento disponigita de Flavie

ILEI-konferenco en Ostendo (Belgio)

Quelle chance pour les espérantistes qui se sont inscrits à la 48-ème Conférence Internationale de ILEI à Ostende du 17 au 25 juillet 2015 ! Logés pour la plupart dans une Auberge de Jeunesse confortable, située à 200 m de la plage, ils se voyaient offrir un programme très riche et pour tous les goûts. Des réunions de travail pour les membres du Conseil d'administration, des cours pour ceux qui veulent progresser dans l'usage de l'espéranto, un séminaire de formation pour les enseignants soucieux eux aussi de se perfectionner, un symposium portant sur un thème bien choisi et des excursions pour découvrir une partie de la Belgique sous un soleil radieux.

Une tradition bien respectée a délié les langues et aidé à faire connaissance dans une joyeuse ambiance : la soirée gourmande où chacun a apporté une spécialité de son pays ; nous étions 159 venant de 34 pays différents et nombreux étaient les Asiatiques !

Tout le monde a été reçu à la Mairie d'Ostende le dimanche matin et a apprécié le discours de bienvenue de Monsieur le Maire. L'après-midi, il y avait fête sur la grand-place et les espérantistes ont pu goûter et participer aux animations locales. Lundi et mardi soir, nous avons aussi bénéficié de deux feux d'artifice sur la plage. Celui du mardi était en l'honneur de la fête nationale de la Belgique, le 21 juillet.

Le festival des langues a enthousiasmé les participants, c'est près d'une trentaine de langues qui ont été présentées pendant plusieurs heures. Je n'en citerai que quelques-unes : le népalais, l'indonésien, l'arménien, le hongrois, le russe, le chinois, le français,

le danois, l'espagnol, le néerlandais, le malgache, le japonais, le swahili, le roumain, le coréen, le polonais, le lingala, le joruba...

Les excursions pour visiter Bruxelles, Bruges, Anvers et d'autres lieux intéressants ont eu beaucoup de succès. J'ai eu la chance de partir dans une voiture où quatre continents étaient représentés et c'est là qu'il est agréable de voir comme l'espéranto fonctionne bien, ce fut une journée mémorable.

Les soirées ne manquaient pas de panache, depuis la présentation du film « La germana kuracisto », sous-titré en espéranto, à la soirée d'adieu avec Mikaelo Bronŝtein, en passant par la soirée européenne, la soirée internationale, sans oublier le banquet traditionnel suivi du bal animé par des musiciens locaux.



*Les participants à la Conférence d'ILEI
devant la mairie d'Oostende*

Les rencontres internationales de ILEI sont ouvertes à tout espérantiste, la prochaine aura lieu près de Budapest, à Nyiregyháza, en Hongrie, tout de suite après le Congrès mondial qui aura lieu en Slovaquie, à Nitra, du 23 au 30 juillet 2016.

Monique Arnaud

23-a Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo kaj turismo



Ĝi okazis en Rosas (Katalunio) de la 3-a ĝis la 10-a de Oktobro.

Partoprenis en ĝi Monique kaj Pierrot Prezioso, kiuj sendis la jenan raporteton : *"Bonne semaine avec une centaine de participants mais le temps était assez frais. Conférences et visites intéressantes. Beaucoup d'amis revus dont certains se sont inscrits pour MES 2016."*

Ni ricevis du malĝojajn informojn :

**forpasis la edzo de Nina Gouriou, nia amikino, kiu plurfoje gvidis kurson dum niaj staĝoj ;
forpasis ankaŭ Madeleine Delagneau, kelkajn monatojn post sia kara edzo Rolland.
La tuta federacio sincere kondolencas al Nina kaj al la familianoj de Madeleine.**

Paĝo de la komencantoj

teksto en facila Esperanto

Kelkaj Eŭropanoj manĝis en ĉina restoracio ian viandaĵon, kiun ili opiniis rostita ansero. Ili deziris scii, ĉu¹ ilia supozo estas² ĝusta. Sed ili ne komprenis la ĉinan lingvon kaj la gastejestro ne scipovis paroli Eŭropajn lingvojn.

Pro tio ili montris per la fingro al la manĝaĵo kaj kun demandaj mienoj ili komencis krei kiel anseroj : kvak-kvak-kvak ?

Responde al tio la ĉino skuis la kapon kaj bojis : vaŭ-vaŭ-vaŭ !

klarigoj / atentigoj

-1: traduction du "si" français

Attention de ne pas confondre le "si" interrogatif et le "si" du conditionnel.

exemple de "si" interrogatif :

Est-ce que je pourrai venir ce soir ? Je ne sais pas.

= Je ne sais pas **si** je pourrai venir ce soir.

Ĉu mi povos veni ĉivespere ? Mi ne scias.

= Mi ne scias, **ĉu** mi povos veni ĉivespere.

exemple de "si" du conditionnel :

Je voyagerais dans le monde entier, **si** j'étais riche.

Mi vojaĝus tra la tuta mondo, **se** mi estus riĉa.

-2 : concordance des temps

Elle est plus logique en espéranto qu'en français.

français :

"Est-ce que notre supposition **est** bonne ?"

Ils voulaient le savoir.

= Ils voulaient savoir si leur supposition **était** bonne.

> **en français, différence de temps entre le style direct et le style indirect.**

espéranto :

"Ĉu nia supozo **estas** ĝusta ?" Ili deziris tion scii.

= Ili deziris scii, ĉu ilia supozo **estas** ĝusta.

> **en espéranto, pas de différence de temps entre le style direct et le style indirect, ce qui est quand même plus logique, non ?**



Plurelekta demandaro

*laŭ verkoj de Robert Llorens
eldonitaj de Esperanto-Info*

1 - gramatika

a) vi kapablu fari ?

1 - ĉu ; 2 - kion ; 3 - kiu

b) vi kapablu fari ion ajn ?

1 - ĉu ; 2 - se ; 3 - kaj

c) Kiu vivos, tiu vid.....

1 - ~us ; 2 - ~as ; 3 - ~os

2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "afekti", "kortuŝi" aŭ "ŝajnigi" por traduki la francan "affecter"

1 - feindre :

2 - impressionner :

3 - faire des manières :

d) elektu "aganto", "agento" aŭ "oficisto" por traduki la francan "agent"

1 - commerce :

2 - douane, police :

3 - chimie, physique, philo :



Superzam'

proponita de

Jean-François Cousineau

1. *Kiu estas la nomo de la lingvo-kontrola institucio kreita en UK 1905 ?*

a- Lingvo Komitato b- Akademio de E-o c- Centra E-o-Komitato

2. *Kiopaĝa estis la Unua Libro de D-ro Esperanto ?*

a- 28 b- 44 c- 56

3. *Kiu el tiuj muzikbandoj plej tohuvabohuas ?*

a- Dolĉamar b- Persone c- Kajto

4. *Kio estis la profesio de Zamenhof ?*

a- okulkuracisto b- instruisto c- komercisto

5. *Kiu korelativa finaĵo signas objekton ?*

a- a b- o c- es

6. *Kiu estas la plej longa rivero en Eŭropo ?*

a- Danubo b- Rejno c- Volgo

Plurelekta demandaro

1 - gramatika

a : 3 ; b : 2 ; 3 : 3

2 - vorto-trezora

ĉ1 : akcepti ; ĉ2 : konfesi ; ĉ3 : permesi

d1 : lerteco ; d2 : sperto ; d3 : adreso

Solvoj de la demandoj en EP 101 - somero 2015

Superzam'

1 a > Boirac ; 2 b > Mia penso

3 a > Kajto ; 4 b > 1917

5 c > a

6 b > Jangzio (6895 km)



En la 101-a numero de nia gazeto, estis artikolo (je la paĝo 10-a) pri la internacia konkurso « Poezio el ĉiuj ĉieloj », organizita de la Komunumo *Sant' Angelo di Brolo*, en Sicilio, kaj de la Itala Esperanto-Federacio.

El nia federacio, kaj cetere la du solaj el Francio, kontribuis al ĝi *Anita Collomb*, per sia poemo « Himno al la virino », kaj mi mem, per « Mia ŝirmej' ».

La 7-an de Aŭgusto estis anoncita la verdikto de la juĝantaro : « Mia ŝirmej' » ricevis la specialan premion de la Itala Esperanto-Federacio por "la plej bela poemo en Esperanto" ; la teksto estis tradukita en la italan kaj iĝis ero de dulingva antologio.

Ankaŭ la teksto de *Anita*, « Himno al la virino », estis elektita por la libro-forma poemkolekto kaj aperis dulingve en ĝi.

La antologio de la dua eldono de « Poezio el ĉiuj ĉieloj » estis oficiale prezentita okaze de Premia Ceremonio, kiu okazis la 18-an de Oktobro en la Urba Teatro de Sankta Anĝelo de Brolo (la Sicilia « Esperanto-Urbo »).

Pascal Vilain



El la mesaĝkesto de la legantaro

Pierre Oliva

Pli kaj pli bela ! Sed kia laboro, malgraŭ la aĉega varmeco ! Dankegon.

respondo de la red.

Estas ja pli facile zorgi pri la tri alizezonaj numeroj de nia gazeto, kiam malpli ardas la suno !

Soledad Dubos

Merci pour ce 101ème numéro, je lis toujours « Espéranto-Provence » avec un immense plaisir !

respondo de la red.

Plaĉas al mi scii, ke federacianoj plezure legas nian gazeton ! Mi do ne vane laboras...

François Degoul

Dankon pro la sendo, en kiu mi rekonis mian fidele represitan kaj ilustritan kontribuon.

respondo de la red.

Estis por mi plezuro povi enmeti artikolon pri evento via, kiu okazis en nia regiono.

Jean-Yves Costesèque

Mi plezure ĵus tralegis la gazeton n° 101. Gratulon.

respondo de la red.

Dankon pro via kuraĝiga mesaĝo, Jean-Yves !

A noter sur votre agenda



dans notre fédération

novembre 28-29 - Le Beausset (83) : fin de semaine culturelle (voir le bulletin d'adhésion)

décembre 12 - Saint-Raphaël (83) : "Zamenhof-festo" (infos : club local)

décembre 13 - Avignon (84) : "Zamenhof-festo" (infos : club local)

mars 5-12 : Les Issambres (83) : "MES" (voir le bulletin d'adhésion)

mai 5-8 : Marseille (13) : Congrès national d'Espéranto-France (infos à venir)

en France

octobre 24 - novembre 1 - Grésillon (Baugé - 49) cours "Aŭtune" (voir site www.gresillon.org/automne)

novembre 14-15 - Stella-Plage (62) : 27ème rendez-vous européen

<http://esperanto.nord.online.fr/fr/index.htm>

novembre 14-15 - Saint-Brieuc (22) : Stage d'Armor-Espéranto

<http://armor-esperanto.fr/esperanta-stago-en-saint-brieuc/>

décembre 5 - Dijon (21) : Stage de langue

infos : esperanto21@orange.fr

en Europe

octobre 30 - novembre 1 - Mataró (Espagne) : 37ème Congrès catalan d'espéranto

<http://www.esperanto.cat/kongresoj/2015/index.php>

octobre 30 - novembre 1 - Xérès (Espagne) : 19ème Congrès andalou d'espéranto